


Oficiala Bulteno de la **AFRIKA KOMISIONO DE UEA** | 18-a jaro, n-ro 50, 28-an de majo 2024

# ENKONDUKO

Estimataj legantoj,

La Bulteno en viaj manoj ne estas simpla legaĵo, sed estas oficiala informilo de la Afrika Komisiono de UEA, kiu sciigas al vi informojn pri diversaj aktivaĵoj pri la esperanto-movado en Afriko. Ĉi numero, kiel la aliaj du jam aperintaj, alportas al vi kernajn informojn aperintajn en malsamaj esperantaj sociaj retejoj ĉefe fokuse al la (tre) baldaŭ okazonta 109a Universala Kongreso de Esperanto en Aruŝo /Tanzanio, la unua UK en Afriko.

Krome, en ĉi tiu numero vi ekscios pri surloke en Aruŝo okazantaj aktivaĵoj, pri diversaj prelegoj pri Tanzanio, pri la kongresurbo kaj pri multaj aliaj informoj relative freŝaj. Vi ekscios ankaŭ pri afrika talento en verkado, programado de aplikaĵo pri lernado de esperanto, pri Esperanto-kursoj kaj pri aliaj buntaj informoj koncerne esperanton okazantan en Afriko. Eblas legi ankaŭ pri nekrologa informo kaj sukcesoj de la junulara agado en Afriko.

Dezirante al vi bonan legadon samideane salutas,

**La redakcio**

****************************************************************************

# ĈU NUR ĜIRAFOJ, LEONOJ KAJ ELEFANTOJ KADRE DE 109-A UK EN ARUŜO ?

Tanzanio estas la plej interesa lando en la mondo, pro siaj multaj narutaj rezervoj kun




diversaj interesaj bestoj, la plej alta monto en Afriko, belaj strandoj de Zanzibaro, bona infrastrukturo, bonkvalitaj hoteloj, agrabla vetero, paco de la lando kaj la gastamaj tanzanianoj.

La 109-a UK proksimiĝas, ĝis nun jam aliĝis pli ol 448 homoj el diversaj mondpartoj. Tanzanianoj kaj afrikanoj tre feliĉas bonvenigi samideanojn al la paca insulo. Laŭ la reklamado de multaj turismaj vidindaĵoj, ŝajnas ke tiu ĉi lando pleniĝas de pli da turismo kaj forgesas la disvastigon kaj instruadon de Esperanto. Evidente, la instruado de la lingvo Esperanto en Tanzanio aktivas, ĉar ekzistas multaj centroj, kiuj antaŭenigas la instruadon de tiu ĉi lingvo. En la urbo Arusha, kie okazos la kongreso, ekde la okazigo de la seminario gvidita de Profesoro Francesco Maurelli, Doktorino Sara, Jeremie kaj Constantine en januaro 2024, krom aliaj sukcesoj de la seminario estis la revivigo de Aruŝa Esperanto-klubo, kiu trejnas Inter 25 kaj 30 studentojn (la enloĝantoj de Aruŝo, studentoj de diversaj altlernejoj kaj kolegioj, kunlaborantoj kaj studentoj volontulantaj en la AICC) du foje semajne ĉe Aruŝa Komputila Centro. La klaso estas bone administrita de

John Magessa kaj Mika Ayo. Danke al UEA kaj Kosmo Strategio kadre de Hakuna Matata projekto pro la subteno de la instruado.

Post iom longa diskuto Inter la LKK kaj la estraro de la Nacia Turisma Kolegio en Aruŝo, oni akceptis enkonduki E-kursojn unufoje semajne (vendrede). Studentoj amase partoprenas la kursojn esperante partopreni la kongreson kaj utiligi la lingvon post la kongreso. En tiu ĉi kolegio ankaŭ aliĝis al la kurso du instruistoj. John Magessa gvidas la kursojn ĉi tie.

Mulele Mbasa kaj Paulo Kusaya instruas la lingvon en Bunda kie aliĝas kaj junuloj kaj plenkreskuloj al la kurso. Dum ĉi tiu monato renkontiĝos grupo da esperantistoj de diversaj regionoj de Tanzanio (kiun Mulele rete instruas) por la ĉeesta praktikado de la lingvo. David Mapengo kunlabore kun Mramba Simba gvidas E-kursojn ĉe Esperanto-mez'lernejo kie centoj da lernantoj lernas ĉi tiun lingvon. Inter tiuj lernantoj 50 intencas partopreni la UK-n kadre de la trovitaj rimedoj. Barnabas Magesse, Samuel Mrisho Pendo kaj Esuebia Temba ankaŭ starigis la E-kursojn ĉe la ŝtata mezlernejo nomata Kihanga en Karagwe distrikto post iom profunda diskuto kaj varbado al la lernejestro kaj gepatroj kiuj akceptis la enkondukon de Esperanto ĉe tiu mezlernejo. Tamen la laboro ne facilas pro manko de rimedoj kaj lernolibroj, la grupo inaŭguris la esperanto-oficejon apud la lernejo celante varbi ankaŭ vilaĝanojn kaj poste partoprenigi dekojn da studentoj al la UK kadre de la rimedoj.

Ĉe la ŝtata Mezlernejo Kaigara kaj la infanĝardeno Verda Lingvo kreita de Muleba Esperanto Centro, situanta en distrikto Muleba, instruisto John Magessa jam longe instruis antaŭ ol translokiĝi al Aruŝo pro la prepar'laboro de la kongreso kaj instruado. Retaj kursoj ankaŭ okazas en diversaj sociaj retejoj kiel Zoom, Vacapo kaj Jitsi gvidataj de S-ro Mulele Mbasa, John Magessa, Mashauri Costantine kaj Aime Patrick. Dekoj da studentoj partoprenas en tiuj klasoj kvar foje (lundo ĝis ĵaŭdo) kaj alia grupo ses foje semajne esperante ĉeesti ĉi tiun historian kongreson.

Sincerajn dankojn al ĉiuj subtenantoj de la lokaj E-movadoj en Tanzanio. Se vi ŝatus subteni kaj plifortigi la movadojn lokajn bonvolu skribi ĉe esperantotz@gmail.com

Vi povas aliĝi al la 109-a UK ĉe http://uk.esperanto.net/

John Masgessa

# TEJO PLUSUKCESAS EN AFRIKO

## *Senegala Esperanto-Junularo oficiale landa sekcio de tejo*




Apenaŭ organaniziĝinta dum la 8-a Afrika Kongeso de Esperanto okazinta en Thiès/Senegalio, sia hejmlando kaj tiam kongreslando, senegalaj junuloj intensigis sian klopodadon por la efektivigi sian membriĝon en tejo. La tiam starigita estraro de Senegala Esperanto-Junularo (SEJ) kun **AHMADOU BAMBA Diaw** kiel Prezidanto, post la kongreso, plukunlaboris tiucele ĝis kiam tiu estraro estis anstataŭigita de alia nova ĝis nun laboranta kaj havas kiel Prezidanto **HAWA DIOL.**

La membro de SEJ estas senkompare plej demokratiaj, kleraj kaj kunlaboremaj. Ilia kunlaboro vervis, dekomence hepate de la tiama Prezidanto de tejo **Albert Stalin Garrido, Patricio Iglesias** (Estrarano pri Landa kaj Faka Agado) ankaŭ de **Michel Boris Mandirola kaj Espoir Ngoma Kasati,** SEJ sukcesis arigi ĉiujn necesajn ŝtatajn dokumentojn. Tiuj kunlaborantoj helpis al SEJ-anoj ankaŭ pri alĝistigado de statutaj artikoloj por alĝistigi kaj kongruigi la ilin kun la Statuto de tejo.

La laboro estis tiel temporaba kaj energikonsuma, ke por sukcesi pluraj kunvenoj retaj kaj ĉeestaj estis oftecaj. Finfine, voĉdono estis organizita por ke la Komitato de tejo aprobu

aŭ malaprobu la kandidatiĝon de SEJ kiel Landa Sekcio de tejo en Senegalio. El 31 rajtantoj, voĉdonis 23. Pore voĉdonis 22, voĉdonis kontraŭ 0, sindetenis 1; ne voĉdonis 8. Pro tio, la Senegala Esperanto-Junularo estis aprobita kiel Landa Sekcio de tejo en Senegalio.

La plebiscito de SEJ fontas el la brava kunlaboro de sia membraro ĉar kvankam ĝia Landa Asocio, Senegala Esperanto-Asocio (SEA) ankoraŭ ne estas oficiale Landa Asocio de UEA, tiuj junuloj ornamis sian famon per solida kunlaboro kaj kleruleca organizado, sed precipe, per demokratia laboro.

La Afrika Komisiono de UEA, plejparte konsistanta el junuloj, pleje gratulis tiujn bravajn aktivulojn ĝojante, ke la Kongreso okazinta en Senegalio postlasas bonajn spurojn; do, la celo de la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto estis atingita!

**Espoir Ngoma Kasati**

## *Afrikano denove sur junulara movada scenejo!*




Tejo celas la efektivan tutmondigon de sia agado tial ĝia agado en la lastaj jaroj vidiĝas en preskaŭ ĉiuj kontinentoj. Malkiel entaŭe, tejo vidas pli kaj pli da kreso de sia membraro el ĉiuj kontinentoj.

Ne postrestis afrikaj junuloj, jaron post jaro ili enmovadiĝas kaj forte kontribuas al la disvastiĝo de la movado en afriko. Danke al tio, siaflanke tejo ne hezitas gratuli kaj subteni siajn bravulojn kaj rekompencas ilin diversmaniere, precipe elektante ilin kiel gajnintojn de la Konkurso Partoprenu IJK-n, donas eblon al siaj aktivuloj partopreni plej prestiĝan esperantistan junularan eventon. Jam nun, dum du sinsekvaj jaroj tejo elektas gajnintojn el Afriko. En 2023 estis elektita **Ranja Jean d´Arc Lydie** por partopreni la IJK-n en Italio.

Aktivulino el Malagasio, fame konata pro ŝia agado en Madagaskaro kaj en la Afrika Komisiono. Ĉijare, en 2024, estis elektita **Espoir Ngoma Kasati** por partopreni IJK-n en Litovio. Konata pro lia agado en la DR. Kongo, en Afrika Komisono, kiel Komisiito de tejo pri Edukado kaj en aliaj diversaj movadkampoj.

**Espoir Ngoma Kasati**

# Konferencumi CivilSocie en Najrobio

La 69-a Civila Societo okazigita ĉe la Oficejo de Unuiĝintaj Nacioj en Najrobio, kie ni duope ĉeeste sekvis atente estas la unua iam organizita en Afriko . Ĉi tio ,



estas historia por Kenjo kaj la tuta Afriko okazigi ĉi tiun konferencon por la plej unua fojo. Estas notinde ,ke tiu UN-a evento komparindas kun la venonta Universala Kongreso okazonta en Tanzanio unuafoje por afrikanoj.

La ceremonio estis oficiale malfermita de sinjorino Amina Mohamed, kiu konsistas el kvin Anstataŭaj Ĝeneralaj Sekretarioj , kiun ni kuraĝe salutis nome de UEA kaj aparte nome de Tonkin Humphrey. Ankaŭ , nome de Tonkin Humphrey ni salutis Doktoron Liberato C. Bautista , kiu invitis nin ĉeesti la diservon en Metodista Preĝejo de Kitengela-Kenja. De tie, ni kaptis la okazon priparoli pri Esperanto kaj prenis kunan foton kun la geeklezianoj.

Jen ligilo pri tio: https://drive.google.com/drive/folders/1U2G4CjfAGAJSLIIDBFSsPP2dGjiANrCR?usp=drive_link

Kun multaj antaŭsignitaj konversacioj, unu el la ĉefaj celoj de ĉi tiu konferenco estas memorigi homojn, ke ni loĝas sammonde kaj ke ĉiuj malsukcesoj, kiujn ni alfrontas, estas trakteblaj per nia kolektiva klopodo. La Konferenco de la Civila Socio de Najrobio konsistas el reprezentantoj de la civila socio el la tuta mondo per la ŝanco interagi kun UN-oficialuloj, registaraj eminentuloj kaj aliaj koncernatoj pri diversaj aferoj rilataj al nia terglobo.

La konferenco celas plifortigi dialogon, kunlaboron kaj partnerecon inter Unuiĝintaj Nacioj kaj civilsocio por alfronti gravajn defiojn kiel homajn rajtojn, daŭripovan disvolviĝon, packonstruadon kaj socian justecon. Per laborrenkontiĝoj, sesioj kaj interkonektado, partoprenantoj diskutis

novigajn solvojn, antaŭvidis plej bonajn praktikojn kaj strebas por politika ŝanĝo por difini **kies celojn de la Unuiĝintaj Nacioj.**

Ni proponis kion fari sed estas tempo pripensi kiel procedi. Ni fariĝas tiel komunumo de nacioj por trakti iujn ĉiutagajn aferojn kaj tiujn, kiuj povas handikapi nian estontecon. Do, daŭripova evoluo, klimata ŝanĝo, bona regado, paco kaj sekureco estas niaj komunaj bataloj.

Ni antaŭĝojis pro la sperto de la unua tago. Tamen ni elpense starigis tri demandojn, kiujn oni devus pritrakti:

1. Kial NROj kun ECOSOC-statuso ne povas akiri **konstantajn insignon** ĉe UN-o? Aŭ kial ŝajnas, ke tiu ĉi oficiala centro de Unuiĝintaj Nacioj eĉ ne estas menciita en la akreditsistemoj de Unuiĝintaj Nacioj?

2. Ĉu UN-o havas ambasadorojn kaj plenumajn konsiliojn en ĉiu lando?

3. Kiel funkcias ĉi tiu oficiala centro?

Respondite de François Lo Jacom, la NROj partneraj de ECOSOC rajtas nomumi reprezentantojn en ĉiuj UN-sidejoj, inkluzive Najrobon (krom Unesko, kiu havas sian propran proceduron), sed unu homo estas reprezentanto nur en unu sidejo. Nur la prezidanto de la NRO rajtas ricevi tutjarajn legitimilojn por ĉiuj kvar sidejoj. Supozindas , ke la proceduro, per kiu oni nomumu reprezentantojn en Vieno, Ĝenevo kaj Novjorko, validas ankaŭ por Najrobio, kondiĉe, ke oni havus surlokajn reprezentantojn. Sed pro longa distanco de reprezentantoj estus malfacile plenumi la taskon plentempe. Aldonindas, ke UEA havas plentempajn volontulojn kiuj plenkore transprenus la taskon kaj plenumus ĝin efikmaniere, ekz.s-ro Mana Brinson.

Por ĉi tiu unua tago (la Tago de la pakto), ni estis engaĝiĝitaj ĉeesti la Konferencon de la Civila Socio de Unuiĝintaj Nacioj por subteni La Pintkunvenon de la estonteco, kiu okazos en septembro 2024 en la Ĉefsidejo de UN en Novjorko. Kiel Kunordigantoj ĉe niaj lokaj Organizoj kaj kiel rajtigitaj reprezentantdelegitoj de Universala Esperanto Asocio, partopreno al ĉi tiu dialogo estas pozitiva paŝo al la ĝusta direkto rilate inkluzivecon de junuloj decidi pri la aferoj de la suda Terglobo.

La temo Paco altiris nian atenton, ĉar Esperanto estas lingvo, kiu kampanjas por daŭra mondpaco.

- La laborrenkontiĝo titolita "Povigi Junularon por Daŭripova Evoluo kaj pli Justa Estonteco" , sekvis Mana.
- La laborrenkontiĝo "Povigi la civilan socion: post 10 jaraj spertoj kaj la vojo al kapo por SDG-oj" sekvis Joanice en alia sesio.
- La laborrenkontiĝo pri "nuligo de la Pakto por la Estonteco" sekvis Joanice, kie ŝi kuraĝeme faris la observon pri **la lingva lingvo** ĝuste en la pakto en la pintkunveno por la estonteco, kio skuis la ĉeestintaron.
- Laborrenkontiĝo pri demokratio, paco kaj sekureco en Afriko kaj la ĝeneva plurflanka tagorda afero, ĉeestita de Mana Brinson.
- La laborrenkontiĝo pri rekomendoj de la civila socio pri la kvin ĉapitroj de la pakto, ĉeestis ambaŭ gereprezentantoj de UEA.
- Konstruado de paco kun fokuso sur la potencialo de Afriko en subteno de La

Pintkunveno de la Estonteco, kiu okazos en septembro 2024 en la Ĉefsidejo de UN en Novjorko. Kiel gedelegitoj de Universala Esperanto Asocio, aliro al tiu ĉi dialogo estas pozitiva paŝo al la ĝusta direkto rilate inkluzivecon de gejunuloj el Tutmonda Sudo en decidofarado.




Kun UEA ni estas subtenantoj de lingva juro. Strategie, ni okupiĝis  por postuli specialan atenton al lingvaj rajtoj antaŭ ol la pakto estu observita ĉar la pakto ne mencias plurlingvecon aŭ lingvajn rajtojn. Sed por civilaj socioj en UEA kaj UN, urĝas integri la punkton de lingvaj rajtoj por inkluziveco kaj malferma komunikado por alfronti ĉi tiujn terurajn krizojn tra kiuj pasas nia mondo. La temo de Tutmonda Paco estis atentokapta. Ĉi tio estas ĉefe pro la fakto, ke Esperanto estas lingvo kiu strebas al eterna Tutmonda Paco.

Notu, ke tri ĉefaj punktoj aŭ demandoj estis en la tagordo rilate al inkludo :

- Monda Organizaĵo pri Sano ?
- Kio ?
- Kiel?

1) Kiu devus esti inkluzivita, kaj havi aliron al rimedoj? La respondo al ĉi tiu demando estas, ke ĉiuj homoj de ĉiuj sekcioj estas inkluzivitaj: gejunuloj, geinfanoj, virinoj, indiĝenaj, glatoj, gemaljunuloj ktp.

2) Kion fari por inkludo? La sekvaj elementoj permesas inkludon por pli bona mondo sen diskriminacio: - Integreco

- Kuntekstigo
- La nuanca loko de la ekskluduloj

3. Kiel atingi inkludon kaj praktiki ĝin?

- Sekvo de deklaroj kun ĉiuj sociaj tavoloj,
- Interagaj konversacioj,
- Regionaj inkluzivaj grupoj,
- Paroli efike pri inkluzivaj indikiloj kaj normoj.

Menciindas, ke amaso da gepartoprenintoj kaj reprezentintoj de diversaj organizoj de la Civila Socio montris sian intereson voli havi eblajn informojn pri kio estas Esperanto. Malsupre estas la demandoj, al kiuj ni devis respondi:

- Ĉu vi estas konvinkita, ke Esperanto estas mondlingvo?
-  Ĉu vi estas registrita kiel Organizo ĉe CoNGO?
- Ĉu vi kunlaboras kun Unesko, UN pro tio, ke vi pledas por edukado kaj promocio de gepatraj lingvoj sen diskriminacio? Ni respondis al la demandaro tute kontentige kaj tuj ricevis petojn pri kiel efike kunlabori kaj eventuale krei vacapan grupon per kiu ni instruu ilin Esperanton. Tamen , rapide ni proponis ilin viziti la ligilon : esperantoporun.org

Jen kelkaj geinteresintoj, organizaĵoj kaj iliaj adresoj ĉu retaj, kiuj  eventuale kaj aparte interesiĝis pri Esperanto:

1. Fido-Kenjo: +254718741319
2. Josuo-Kenjo: +254714863125
3. Fondaĵo Arda Jabesa: ardhajabesafoundation@gmail.com
4. SDGs Kenja Forumo: florence@sdgkenyaforum.org
5. Grupo de Memhelpo Hazina: hazina23@gmail.com
6. ODRAPNA-AFRIKO: odrapna.africa.coordo@gmail.com
7. David Baraza : baraza@umckenya-ethiopiaconference.org
8. John Lavut, Methodist Ĉurĉ KITENGELA : johnmuekelavuta@gmail.com

Unu el la renkontitaj malfacilaĵoj por popularigi nian lingvon estis la manko de Esperantaĵoj kaj broŝuroj. Sed ni devis direkti ilin al la retejo: esperantoporun.org kaj estis presinta kelkajn broŝurojn senditajn de nia amiko François LO Jacom per niaj modestaj eblecoj.

Ni estis en rekta kontakto kun altrangaj ekzekutivoj de NROj, CoNGO, Konferencoj, Neregistaraj Organizoj havantaj konsultiĝajn rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj, gvidantoj de religiaj kaj eŭropaj konfesioj, Konferencaj organizantoj, Fondaĵo por Subjektiva (NRO en speciala Konsultiĝa Statuso ECOSOC kaj UN). DPI, UNICEF, NGO), Action Relief, BRAC, rilatoj kun la registaro, GJG, (Tutmonda Justeco-Grupo), Crisis Intervention, UAHR, GRENHOPPER, LEĜA PAKTO DE LA ESTONTECO, TUTMONDA RETO POR TUTMONDA EFIKO, Fundo de Unuiĝintaj Nacioj, SGI-Oficejoj por UN-Aferoj ktp. La fotosesio kaj prenado de mallongaj filmetoj kun la partoprenantoj kaj organizantoj de la konferenco estis faritaj kune kun nia kunreprezentantino Anny Joanico kaj ankaŭ bildoj rilatataj al niaj subtenaj agadoj aperas en ĉi tiu raporto klakante la ligilon : https://drive.google.com/drive/folders/1U2G4CjfAGAJSLIIDBFSsPP2dGjiANrCR?usp=drive_link




Pri videoj, ni muntos ilin estante hejme-n kaj plusendos en apartan ligildosieron estonte.

Impresitite, ke la konferenco de la Civila Socio organizita en Kenjio ek de la 9-a ĝis la 10-a de majo ĉi-jare, estis por ni, gereprezentantoj de Universala Esperanto-Asocio , lerneja konferenco, ege ora okazo por varbi pri nia lingvo. Estis renkontiĝa ŝanco de homoj el diversaj komunumoj kaj kulturoj. La problemo pri la situacio en

Gaza militanta kun Israelo nur surpraĵe primenciita, la situacioj el Ukrainio kaj el Demokratia Respubliko Kongolando estis mallonge menciitaj sed ne estis klaraj respondoj en tiu senco.

La angla estis la centro de tiuj interŝanĝoj kaj diskutoj. Neniu ĝenerala foto de la partoprenantoj estis farita, kvankam la konferenco precipe temis pri civila socio kaj la Unuiĝintaj Nacioj ĝenerale! Kiel ni dirus, ke ni estas Unuiĝintaj Nacioj?

Do, patro patru, filo filu. Tial la neceso memorigi la Prezidanton de Universala Esperanto-Asocio, sinjoro Duncan Charters,memorigi la diversajn instituciojn kiuj subtenas diversskale Esperanton kaj la personoj engaĝitaj , eĉ kiuj reprezentas UEA-n ene de la diversaj organizaĵoj internacie humanitara, regiona, UN, referencante al Tonkin Humphry, François, LO Jacom, Sara, Martin S, kaj multaj aliaj, provizi la necesajn ilojn por ke Esperanto estu la tutmonde parolata lingvo por alfronti ĉi tiun gravan defion, kiu turmentas la tutmondan komunumon kaj ties enloĝantojn. La ferma kunsido estis farita de la Prezidento de Kenjio kune kun la Sekretario de UN-o

Tiu ĉi raporto estas frukto de la laboro de gereprezentantoj de Universala Esperanto-Asocio ĉi-kaze: Anny J. kaj Mana Brinson.

La fotaro estis farita kune kun Anny sed ankaŭ petitaj de kelkaj partoprenantoj.

Kune: Brinson Mana (DRC), Anny J. (Burundo).

**Mana Brimson**

## MINACOJ MULTAS KAJ LAMIGAS LA MOVADON EN AFRIKO






La diluvo kiu falas sur la teron en la orienta parto de afriko ne lasas iun tiean landon indiferenta. Diverslande en tiu parto de la kontinento, homoj veege plorĝemas serĉante ian konsolon, sed la naturo ŝajnas surda kaj pliakrigas la damaĝon sur ilin. Naturaj katastroj kaŭzataj de inundantaj riveroj, kiuj akve satnutras rojojn, kiuj siavice

superversiĝas kaj malkonstruas loĝdomojn kaŭzante pereon de infanoj kaj plenkreskuloj. La plej danĝeraj dumnoktaj superbordiĝintaj riveroj kunportas sub sin vivulojn, kovras ilin per altdimensia kotego, familioj pereas!
Krom la neatendita superakvado, urboj apudantaj lagojn troviĝas en agresama envado de lagoj. Homoj perdas siajn loĝejojn, foĝas kaj fariĝas senhejmuloj pro la akvoaltiĝo de tiuj lagoj. Esperantistoj ankaŭ spertas tiun veindan klimatan ŝanĝigon, kio tiuflanke iel paralizas la movadon.
Kenjio, Burundo, Tanzanio, DR. Kongo kaj aliaj apudmaraj landoj dronas en saman katastrofon!
Krome, la militoj oriente de DR. Kongo staras kiel alia negativa faktoro por la movado. Pluraj esperanto-kluboj aktivantaj en tiu regiono alfrontas konstantajn perturbojn pro fuĝado de ties anoj al pli sekuraj lokoj, kie igas la movadon tie lamadi.

**Espoir Ngoma Kasati**

# AFRIKA RETRADIO






La projekto "Afrika retradio" komenciĝis en oktobro 2022 kaj efektiviĝas la 29-an de Julio 2023 danke al la kontribuo de multaj esperantistoj tra la mondo. La mono-varbado de la projekto estis kunordigita de François Lo Jacomo, estrarano de UEA, kiu laboris diligente por ke la projekto sukcesu sub la gvido de UEA kaj de Afrika Komisiono de UEA.
La celo de la projekto estis plurfaceta. Unu el la ĉefaj celoj estis reklami kaj varbi alilandajn partoprenantojn al la 109-a Universala Kongreso de Esperanto en Tanzanio.
Krome, la projekto celis disvastigi konscion pri homaj rajtoj kaj fari pli facileblajn kulturajn interŝanĝojn inter diversaj komunumoj.
Dum la daŭro de la projekto, multaj elsendoj estis realigitaj en kunlaboro kun diversaj esperantistoj tra la mondo. Inter ili estis Clarissa Sabatini, Mirejo Grosjean, Mioranantena Raveloharison, Emile Malanda, Cyprien Guya kaj multaj aliaj el Kubo, Kanado ktp. Ili ĉiuj liveris signifajn kontribuojn al la sukceso de la programoj de la radio.

- La retradio havas aplikaĵon elŝutebla.
- La retradio havas sidejon, kiu gastigas la materialojn sekure.

La retaj reagoj al la projekto estas pozitivaj
https://www.facebook.com/share/v/jN2EoLR8ZGG1VzJk/?mibextid=w8EBqM
- Clarissa intervenas pri Muziko kaj Kultura horo
- Miora zorgis pri deklamado de poemoj kaj esperanta vortoprovizo

La partoprenantoj de la projekto estis entuziasme engaĝitaj kaj laboris kune por atingi la celojn de la projekto. La kunlaboro inter diversaj esperantistoj montris la potencon de internacia samlaboro en disvastigado de kono kaj kulturo.





En konkludo, la projekto "Afrika retradio" estis ne nur rimarkinda ekzemplo de internacia kunlaboro, sed ankaŭ efika rimedo por atingi kulturajn kaj sociajn celojn tra la disvastigo de Esperanto, de informoj kaj konoj. Ĝia sukceso estis rezulto de la pasio kaj dediĉo de ĉiuj partoprenantoj.

**KOFFITCHE KOPUFIONOU**
**Gen. Sek. De Afrika Komisiono de UEA**
**Kaj kuordinganto de Afrikaretradio**

# INSTRUADO DE ESPERANTO EN MALAGASIO

La instruado de nia amata lingvo bone progresas en nia Insulo. Estas multaj kluboj en la urbocentro, kiel :

- La IEK aŭ Itaosy Esperanto Klubo, gvidita de S-ro Henriel
- La EKA Esperanto-Klubo de Andoharanofotsy, gvidita de S-ino Ranja
- La SK aŭ Skolta Klubo gvidita de S-ino Ranja kaj S-ro Erica
- La Klubo de Esperanto en Analamahitsy gvidita de S-ino Miora
- La VIE aŭ La Verda Insulo de Esperanto en Anosibe gvidita de S-ino Ranja

Nun, iom post iom, ni disvatigas la movadon en aliaj urboj.

Antaŭ kelkaj monatoj, mi instruis Esperanton al gejunuloj skoltoj, sed pro malsano, mi ne povis daŭrigi la instruadon, ĉar por atingi la sidejon de la skoltoj, necesas paŝi dum tridek

minutoj. Buso ne estas. Tial, la 26-an de majo, S-ro ERICA  komencis instrui Esperanton al la Geskoltoj.



## Konatiĝu kun Erica

Li nomiĝas RATAHIANJANAHARY Erica Li aĝas 18 kaj loĝas en la ĉefurbo de Malagasio, Antananarivo. Li ĵus akiris la bakalaŭran diplomon. Li eklernis Esperanton en Februaro 2024. Nekredeble, ĉu ne ? En tri monatoj, li rapide progresis kaj montris grandegan entuziasmon dum la lernado de la lingvo. Li partoprenis en nia Marta Seminario en kiu  eksterlandano, Ulrich Mathias, ĉeestis. Kiam mi petis al li instrui la bazan kurson al Geskoltoj, li tuj jesis kaj tuj preparis por la unua tago. Mi sekvis la unuan kurson por taksi lian instru-kapablon. Li lerte gvidis ĝin.





En 2023, naskiĝis nia klubo en Andoharanofotsy. Ĉiujn Sabatojn matene, mi ricevas 5 gelernantojn en mia domo. Maldekstre estas Jenny, apud li estas Erica , kaj meze la ok-jara knabo estas Itoerantsoa, apud li estas Mirado (kun la okulvitroj) , kaj fine estas Odilon. Erica instruas en la skolta klubo, kaj la aliaj jam bone parolas kaj bone komprenas Esperanton.



## La verda insulo de Esperanto en ANOSIBE



En 2022, mi ekinstruis Esperanton al gejunuloj en mia laborejo, kiu estas lernejo. 17 lernantojn mi havis, tiam. Ili daŭre lernas, kaj nuntempe mi povas diri ke jam estas frukto, ĉar unu el ili ankaŭ ekinstruas al geinfanoj.



Fanja estas unu el miaj gelernantoj. ŝi aĝas 16, kaj lernas en liceo. La 24-an de majo, ŝi komencis la unuan kurson kun 7 jaraĝaj ĝis 12 jaraĝaj infanoj. Sukcesa estis la kurso.

**Lydie Ranja**

# PREPARKUNSIDO EN BURUNDO



Por prepari ĉiujn pri la komuna vojaĝo al UK en Aruŝo, Aime-Patrick MANIRAKIZA kunvokis ĉiujn esperantistojn elektitajn en la unua ondo por partopreni UK-n en Tanzanio. La kunsido okazis en lernejo nomata Liceo Municipo Rohero. Partoprenis 20 en la unua rondo. La celoj de la kunsido estis :

Prepariĝi kaj informiĝi pri la vojaĝ-dokumentoj,

Prepari programerojn rilatajn al la burunda tradicia kulturo.

La unua kunsido okazis en bona etoso ĉar la kandidatoj estis feliĉaj por partopreni la unuan universalan kongreson de Esperanto.

**Aime-Patrick MANIRAKIZA**

# LA KONGA ESPERANTISTARO FUNEBRAS

**Forpasis Christvit Ngongo Mbuangi [03.05.2001 – 30.04.2024]**




Marde, la 30an de aprilo 2024 en Kinŝaso forpasis S-ino Christvit Ngongo Mbuangi, la **sola kaj unika filino** de multjara aganto de Esperanto en DR Kongo kaj premiito de UEA pri elstara agado, S-ino **Alexandrine Omba Tshamena.** Christvit naskiĝis la 3an de majo 2002 kaj ekde 2021 estis membro de UEA. Ŝi sufiĉe frue ekhavis rilaton kun la movado, kie ŝi rapide disvolvis kontaktemon kaj respekton al aliuloj. Ŝi estis studentino sed paralele al la studoj, ŝi partoprenis kaj kontribuis en la aktivecoj de la junulara sekcio de DKEJO. Rapide ŝi fariĝis ne nur konata en DR Kongo, sed ankaŭ en la kontinento.

Tiu ŝia subita morto kaŭzas senegalan konsterniĝon aparte inter kongaj esperantistoj. Ŝi estis unu el tiuj leviĝantaj esperantistaj steloj de la landa movado. Antaŭ nur iom da tempo

ŝi partoprenis en Esperanto-aranĝo, kaj jam ekhavis deziron por la unua universala Kongreso en Afrko ĉijare en Aruŝo.

Al pli ol unu afrika Esperanto-familio ŝi mankos, tamen firme restos en la memoro.

## AFRIKA KOMISIONO DE UEA

***Esperanto en Afriko*** iĝis dumonata oficiala periodaĵo de la Afrika Komisiono de UEA pri la Esperanto-movado en Afriko

**Redaktis** : Espoir Ngoma Kasati, B.P:1023, Lubumbashi, DR Kongo; tel :+243 972 716 042

Kion faras via landa asocio aŭ via loka E-klubo en via loĝloko? Bonvolu verki kaj sendi artikolon pri tio. La redakcio akceptas ankaŭ foloiojn.

Bonvenaj kompreneble estas ankaŭ sugestoj, konsiloj, komentoj por la plibonigo de la bulteno al : *espoirkasati@gmail.com*

**Limdato por la 50-a n-ro** :la 30an de julio 2024.

### Membroj de la Afrika Komisiono de UEA (2022-2025)

S-ro **Aimé-Patrick MANIRAKIZA,** Burundo

S-ro **Koffitche Koufionou**, Togolando

S-ino **Miora Ravelohrison**,Madagaskaro

S-ino **Ranja Robertine Jean d'Arc Zafinitots**, **Madagaskaro**

S-ro **John E. Magessa**, Tanzanio

S-ro **Espoir Ngoma Kasati**, DR. Kongo

## TABELO DE ENHAVO

ĈU NUR ĜIRAFOJ, LEONOJ KAJ ELEFANTOJ KADRE DE 109-A UK EN ARUŜO ?........2
TEJO PLUSEKCESAS EN AFRIKO.............4
Senegala Esperanto-Junularo oficiale landa sekcio de tejo........4
Afrikano denove sur junulara movada scenejo!........5
Konferencumi CivilSocie en Najrobio............6
MINACOJ MULTAS KAJ LAMIGAS LA MOVADON EN AFRIKO............10
INSTRUADO DE ESPERANTO EN MALAGASIO........12
Konatiĝu kun Erica........13
La verda insulo de Esperanto en ANOSIBE........14
PREPARKUNSIDO EN BURUNDO...........15
LA KONGA ESPERANTISTARO FUNEBRAS........16
AFRIKA KOMISIONO DE UEA.................17
TABELO DE ENHAVO...............17